# Ateismo

## Bulteno de Ateista Tutmonda Esperanto-Organizo




Nazimuddin Samad (1989-2016), ateisma bloganto
Foto farita de Zakir Hossain Chowdhury/ Anadolu Agency/Getty Images

N-ro 22

http://ateisto.org

Majo 2016

# Vorto de la redaktoro

Esti ateisto en la nuna mondo povas esti danĝere. Pasintjare en Parizo, okazis atako kontraŭ ĵurnalistoj de la ateisma revuo Charlie Hebdo. Tamen, en la Okcidento, kvankam malfermite esti ateisto povas foje elvoki malaprobon, eĉ ostracismon, malofte estas danĝero, ke oni estos mortigita pro esprimado de opinioj ateismaj kaj kritikaj rilate al religio. En kelkaj ne-okcidentaj landoj, bedaŭrinde, tia danĝero estas pli reala, pli ofta. Tie, esti ateisto signifas esti tre kuraĝa, esti celo de religiaj homoj, kiuj ne toleras vin kaj pretas vin mortigi. Tia kuraĝulo estis Nazimuddin Samad, ateisma bloganto, kies 26-jara vivo estis finita sur strato en Dako, ĉefurbo de Bangladeŝo, la 6an de aprilo ĉi-jare. Omaĝe al li, kaj aliaj kiel li diverslande, ni metis lian foton sur la kovrilo de nia bulteno.

Per tiuj seriozaj vortoj mi komencas mian redaktoradon de tiu ĉi bulteno por memorigi al ni, membroj de ATEO, kaj al aliaj kiuj legas tiun ĉi numeron, ke ateismo ne estas simple iu intelekta sinteno, eble ne varme akceptata aŭ bone komprenata de niaj samsocianoj, sed defio ĵetita antaŭ tiujn, kiuj emas subpremi liberan pensadon kaj debatadon, racian esploradon, kaj pridubadon de dogmoj kaj de la konservativaj, aŭtoritaraj sociaj kaj politikaj strukturoj bazitaj sur ili. Ateismo estas iasence baza testo de libereco kaj demokratio, de preteco akcepti kritikadon de kredoj konsiderataj nekritikeblaj, senpense akceptendaj.

Mi ŝatus, nome de la tuta ATEO-membraro, danki al Christian Rivière por lia kvinjara redaktorado de tiu ĉi bulteno. Pro liaj klopodoj, ĝi sukcesis aperi regule kaj enhavi grandan gamon da interesaj artikoloj. Mi esperas daŭrigi bonorde lian laboron, sed ankaŭ enkonduki iujn ŝanĝojn. Fakte, mi estas membro de redakcia teamo, kune kun Jakvo Schram, Anna Löwenstein, kaj Christian. Jakvo afable transprenis la grafikan aranĝadon de la bulteno, dum Anna konsilas pri la enhavo, kontrolas lingvaĵon (bonŝance por ni, ŝi ja estas membro de la Akademio!), varbas kontribuojn kaj mem kontribuas, kaj aranĝas la presadon de la bulteno. Christian daŭre dissendos la bultenon al la membroj, kaj espereble foje ankaŭ kontribuos al la enhavo.

Dum mia redaktorado, mi esperas igi la bultenon pli tutmonda, por ke ne-eŭropanaj voĉoj estu pli reprezentataj sur ĝiaj paĝoj. Modesta paŝo en tiu direkto estas la du kontribuoj el Azio en tiu ĉi numero, unu el Barato / Hindio, la alia el araba lando. Mi mem estas parte de azia deveno, pasigis la unuajn 11 jarojn de mia vivo en Hindio, poste pasigis du jardekojn en Usono, kaj ekde longe jam loĝas en Pollando. Do, tutmondiĝo de la bulteno estas grava por mi.

Fine, mi invitas vin legi tiun ĉi numeron, kiu komenciĝas per eseo pri la parizaj atakoj en Novembro 2015, kiuj okazis ĉirkaŭ la tempo kiam aperis la antaŭa numero de la bulteno. Ekde kiam ĝi estis verkita, okazis sekvaj multmortigaj atakoj en Bruselo, ankaŭ faritaj de religiaj fanatikuloj. La numero daŭras per kritikoj de Kristanismo kaj Islamo (tiu lasta verkita de liberpensa araba islamano), kaj komentarioj pri ateismo, agnostikismo kaj sendieco. Sekvas aro da artikoloj pri nuntempaj aferoj en la mondo, kiuj iel rilatas al ateistoj, inkluzive du kiuj konfirmas tion, per kio mi komencis tiun ĉi tekston, ke esti ateisto povas esti danĝere. Kiel mia lasta vorto de tiu ĉi "Vorto", mi invitas vin, leginte ĉi numeron, pripensi kontribui al la sekvonta per propra verko aŭ traduko, kaj ankaŭ ĉeesti la kunvenon de ATEO dum la UK en Nitra, Slovakio ĉi-julie. Bonajn ateismajn legadon, verkadon kaj kongresumadon!

**Nyegosh Dube (Pollando)**

## Kiuj estas tiuj homoj?

La morgaŭon de la atencoj en Parizo, mi skribis: "Kiuj estas tiuj homoj?" Mi aŭskultis tiujn, kiuj delonge studis, analizis, esploris, intervjuis islamanojn, ĉu moderulojn, ĉu ekstremistojn, eĉ ĝihadistojn. Mi ankaŭ legis artikolojn de fakuloj, psikologoj, esploristoj – ĉiuj kiuj jam faris longan laboron kaj pro tio rajtas esprimi koheran vidpunkton.

Ŝajnas, ke mi hodiaŭ iom, nur iom, pli klare komprenas, kiuj estas tiuj teroristoj kaj kial ili fariĝis tiaj:

- Krom la ĉefoj kaj la idelogoj, ili plej ofte aĝas inter 20 kaj 30 jaroj.
- Ne ĉiuj estas arabdevenaj islamanoj, multaj el ili estis kristanoj, kiuj poste konvertiĝis.
- Ne ĉiuj estas stultaj homoj sen edukado, sen iu ajn pripenso, tute nekapablaj kompreni tion, kion oni volas, ke ili faru: mortigi la neislamanojn, la "malbonajn" islamanojn, la nekredantojn kaj senkredulojn.
- Al ili ĉiuj oni kredigis, ke la okcidentaj moroj malpurigis la homaron, ke pro tio ilia devo estas detrui tiun civilizacion profite al pura islama mondo.

Sed ŝajnas, ke ĉiuj pro diversaj kialoj estis antaŭ ĉio dezirantaj militi kontraŭ si mem (lerneja fiasko, senlaboreco, familia malakcepto aŭ familiaj problemoj, kondamnoj por pli-malpli gravaj deliktoj, ktp). Fuĝi de sia lando, eskapi el sia familio por integriĝi en radikalan movadon aperas kiel




oportuna ŝanco por fariĝi alia persono, valora militisto aŭ, kial ne, martiro je la nomo de Alaho.

Karaj tutmondaj geamikoj,

Mi daŭrigas mian pripensadon pri la ĵus pasintaj atencoj en Parizo. Ĉi-foje temas nek pri "kontraŭdiaj" desegnistoj (tiuj de *Charlie Hebdo*), nek pri "malfidelaj" judoj (klientoj de la koŝera magazeno en Vincennes). La viktimoj estas "senkulpaj francoj" se mi rediras la bedaŭrindajn vortojn de politikistoj kaj ĵurnalistoj (ĉu la unuaj mortintoj estis malpli "senkulpaj" ol la duaj?).

La januaraj atencoj en Parizo ne estis simpla parentezo sed, ve, nur la komenco de nova tragika rakonto. Aliaj atencoj okazis poste, en Bejruto, en Egiptio kun la eksplodo de rusa aviadilo kaj laste en Bamako, Malio – sen kalkuli la tranĉitajn kapojn de eksterlandaj homoj en Sirio aŭ Irako.

Nova sento naskiĝis en Francio post




la 13a de novembro: ĉiu franca civitano estas potenciala celo. *Sed kial?* Ĉu ĉar la teroristoj estis tre seniluziiĝis post la unuaj atencoj en januaro? Ĉu ĉar ne plaĉis al la murdistoj la milionoj da blankuloj, nigruloj, kristanoj, islamanoj kaj ateistoj, kiuj kuniĝis en multaj urboj la 11an de januaro 2015? Anstataŭ bruligi moskeojn, anstataŭ preni sian pafilon por mortigi unu la alian, milionoj da simplaj civitanoj pace kaj silente malsupreniris sur la stratojn por heroldi sian amligitecon al fundamentaj valoroj de nia lando: demokratio, libera esprimado, laikeco, malkonsento pri perforto – ĉion, kion abomenas la teroristoj.

Kaj kion celas tiuj fanatikuloj? Kion la ĉefteroristoj esperis? Verŝajne instigi rasajn ribelojn, punajn ekspediciojn, masakrojn de tutaj kvartaloj per fero kaj sango, kaj precipe mortigajn alfrontiĝojn inter komunumoj. Tio ne okazis!

Bedaŭrinde por la ĝihadistoj, la reago de la franca loĝantaro ne estas la atendata reago! Ordinaraj loĝantoj ne vidas siajn najbarojn kiel sovaĝajn bestaĉojn, eĉ se ili estas islamanoj! Krom la nunaj tro nombraj ekstremdekstruloj, saĝaj homoj rifuzas kredi, ke islamano nepre signifas teroriston.

Verŝajne okazos aliaj atencoj. Ĉu en denove en Parizo? En alia granda urbo? Ĉu en Bruselo aŭ Berlino? *[Nu, fakte okazis atako en Bruselo! – red.]* En tute neatendita loko? Tio ŝajnas neevitebla, bedaŭrinde. Tamen la barbaroj ne devus kredi, ke ili venkos! Ĉar la plej ofte aŭdataj vortoj ĉie estas la samaj:

"Ni daŭrigos nian vivon same kiel antaŭe!"

"Daŭre ni iros kinejon, teatron, koncerton!"

"Daŭre ni trinkos ĉe teraso de trinkejoj!"

"Daŭre ni manĝos ĉe restoracioj!"

Mi nun ĉesigos mian cerbumadon, konkludante per karikaturo desegnita de Coco, karikaturistino de *Charlie Hebdo:*

Ili havas armilojn
Oni fektedas ilin,
Oni havas ĉampanon!

Gérard Sénécal (Francio)

## Fluctuat nec mergitur

*Post la teroraj atakoj en Parizo la 13an de novembro 2015*

Slogano tro rapide ŝpruciĝis: "Pray For Paris". Tiu "Preĝu por Parizo" disvastiĝis sur la interreto. Poste, komenciĝis jenaj demandoj: Kial preĝi por la ĉefurbo de laika ŝtato? Ĉu vere nepras kontraŭmeti Dion fronte al frenezaj kredantoj je Dio? Tute ne aprobis centoj da interretuloj.

Troegis por la desegnisto Joann Sfar, kiu sendis mallongan mesaĝon plurfoje plusenditan: "Karaj tutmondaj geamikoj, dankon pro la slogano 'Preĝu por Parizo' sed ni ne plu bezonas religion!

Ni fidas muzikon! Kisojn! Vivon! Ni kredas je ĉampano kaj ĝojo!" Kaj sen vere scii kiu decidis pri la afero (interreta magio), alia frazo sen Dio kaj preĝo rapide plenigis la sociajn retojn, tre malnova frazo skribita en iu lingvo kiun oni kredis mortinta: *Fluctuat nec mergitur.*

"Ŝanceliĝas sed ne subakviĝas": tio estas la devizo de Parizo.

*El: "Marianne", 16-26 novembro 2015*

**Komunikis Josiane Ferrand (Francujo)**

## Al agnostikaj kamaradoj el SAT

Jen respondo de D-ro "Ĉiomprava" el svisa ĵurnalo *Der Bund* (22 okt 2015) al la demando - kia estas diferenco inter ateisto kaj agnostikulo?

Nu jes, certe ekzistas diferenco: agnostikulo ne per si mem estas jam ateisto! Li nur asertas, ke neniu scias pri la vera ekzisto de Dio.

Li ne dubas kiel teologo — sed kiel teoriisto. Tial povas ekzisti agnostikaj teistoj — kaj agnostikaj ateistoj.

La agnostikulo nur ne kuraĝas juĝi — li estas teologie abstina. Praktike li estas nomebla milda ateisto.

Li taksas la ateiston kruda kamparano — simile al vandalo. Ateisto scias: Dio ne ekzistas. Same, ĉiu scias pri la neekzisto de feo, koboldo, aŭ paska leporo.

La vidpunkto de ateisto estas simpla negado kontraŭ la dikredantoj.

La agnostikulo ŝvebas super akvoj, ne drononte - sed la ateisto scipovas naĝi.

Ateisto devas repliki la stultan demandon kial li nomas sin ateisto - ĉar ties latina radiko signifas Dio. Ho jes, profunde suspiras la ateisto: "dank' al Dio mi estas ateisto". Pro tia respondo kompreneble ege ĝojas la religiuloj - sacerdotoj kaj pastroj.

La konkludo, ke Dio havas la saman statuson kiel la fluganta spageto-monstro, estas malinstruo, kiel la aserto ke ĉiuj mensmalsanuloj estas kretenoj.

Plej ridinda estis la kampanjo de sciencisto Richard Dawkins, kiu sloganis: "Probable ne ekzistas Dio, prefere vi ĝuu la vivon!"

Cetere, seriozaj sciencistoj ĵus malkovris, ke telepatia kuracado ne efikas en distanco de pli ol 10 kilometroj!

Sed tion vi bonvolu ne kredi!

**Dieter Rooke (Svislando)**

## Ĉu ateismo, ĉu sendieco?

Kelkaj komentoj pri la kontribuo de Ahado Michel en “Ateismo” n-ro 21:

La radiko de la vorto “ateismo” devenas de la greka adjektivo ἄθεος (átheos). Ĝia signifo, laŭeble precize tradukita, fakte estas “sendia”. Sed jam ekestas principa problemo: Ĉu la origina signifo de iu nacilingva vorto, de kiu Esperanta vorto devenas, iel enhavas la “veran” signifon ankaŭ de la derivaĵo? Ŝajnas klare ke ne; ekzemple “centro” ne signifas “pikilo”, kvankam ĝi devenas de la greka κέντρον (kéntron), kiu havas ĝuste tiun signifon.

Bedaŭrinde populara, sed misgvida estis (kaj foje ankoraŭ estas) la ideo, ke la plej maljuna signifo de iu vorto estas iel pli “vera” ol la pli junaj. La scienco, kiu okupiĝas pri la historio de vortoj kaj de ĝiaj signifoj, nomiĝas etimologio – kaj jam tiu nocio enhavas la menciitan eraran ideon, ĉar la greka nocio ἐτυμολογία (etymología), de kiu la Esperanta vorto devenas, signifas laŭvorte “scienco pri la vero”. Kiam la greka vorto estis formita, en la helenisma epoko, la filologoj vere kredis, ke per historiaj esploroj pri lingvo oni povas trovi la “veran signifon” (ἔτυμον [étymon]) de la vortoj. Tiu teorio intertempe montriĝis erara.

Do, kvankam la greka vorto “átheos” signifas “sendia”, ni ne pro tio akceptu, ke “ateismo” esence kaj profunde signifas “sendieco”. Sed tamen mi unue volas prezenti ĉi tie, en kiaj kuntekstoj “átheos” origine aperas. La plej fruaj lokoj en la greka literaturo, en kiuj tiu adjektivo aperas, troviĝas en poemoj kaj dramoj el la 5a jarcento a.n.e. ( = antaŭ nia erao). La vorto estas uzita en mallaŭda, riproĉa aŭ eĉ ofenda senco: “átheos” (“sendia”) estas do persono, kiu rifuzas adori diojn kaj/aŭ estas forlasita de dioj. Ŝajnas entute, ke tiu difino estas farita el la perspektivo de “kredantoj” (do: kontraŭuloj).

Do, ĉu ni ateistoj estas “sendiaj” en plena senco? Certe ni “rifuzas adori diojn”, sed ĉu ni volus nomi nin “forlasitaj de dio(j)”? En la vorto “sendieco” entute ĝenas min, ke ĝi difinas mian konvinkon en (logike) negativa maniero. Mi ankaŭ ne nomus min “sendiabla” aŭ “senanĝela”, kvankam ankaŭ – laŭ mia konvinko – diabloj kaj anĝeloj ne ekzistas, same kiel dio(j).

Do, laŭ mi la vorto “ateismo” estas pli taŭga ol “sendieco”, ĉar la signifo de la Esperanta vorto ne estas plue analizebla, almenaŭ ne en Esperanto mem. Kaj pri “-ismo” oni ne devas tiom zorgi, eĉ se PIV diras ion pri “trudado”: evidente ekzistas diversaj “ismoj”, kiuj ne permesas la ideon de altrudado de siaj doktrinoj: humanismo, homaranismo, pacifismo. Ŝajnas do, ke “ateismo” kiel nocio ankaŭ estas akceptebla por pacifismaj personoj.

Tamen: Kiel filologon min ĝenas ankoraŭ iomete la radiko “ate-”. Mi ja scias, ke tie etimologie kaŝiĝas la ideo de “dio”, neata per la prefikso “a-”. Restas do spuroj de negativa difino en la origina vorto. Eble ni parolu prefere pri “laikismo” aŭ “sekularismo” kiel nia komuna konvinko.

Winfried Schumacher (Germanio)

## Diversspecaj ateismoj

La difino de la diversaj specoj de teismo / ateismo estas malfacila kaj diskutata. Por fiksi la ideojn ni diras, ke al la demando "Ĉu ekzistas Dio?", la *teisto* respondas "jes", la *ateisto* "ne", la *raciisma teisto* "jes, kaj oni povas pruvi lin ekziston per la racio", la *skeptikulo* "mi dubas pri tio, mi eĉ dubas, ke la racio povus respondi al tiu demando", la *fideista teisto* "jes, oni nur povas scii tion per la fido kaj la revelacio", la *senreligiulo* "ne, kaj la religioj estas malbonaj", la *diisto* "jes, sed la religioj estas malbonaj", la *mistika teisto* "jes, sed tio estas tro alta mistero por la homo", la *logika pozitivisto* "la demando ne havas sencon, ĉar la vorto Dio mem havas nenian sencon", la *apatia ateisto* aŭ la *indiferentulo* "mi fajfas pri tio, ĉar tio ne gravas por la homa vivo", la *naturalisto* "Dio ne estas klarigo de la fenomenoj kaj la naturo sufiĉas al si mem", la *ateista kristano* (jes, tio ekzistas!) "ne, sed Jesuo estis elstara estulo", kaj la *agnostikulo* "fakte, mi scias nenion pri tio". Dio rekonos la siajn.

*El: John Allen Paulos, Irréligion: Croire en Dieu? Un mauvais calcul (Senreligio: Ĉu kredi je Dio? Malbona kalkulo). Editions Nouvelles Cécile Defaut, noto en paĝo 27*

Bernard Behra (Francio)

## Kredi aŭ ne kredi

Plian fojon mi ricevis viziton de Atestantoj de Jehovo. Al iliaj argumentoj mia respondo estis simpla: ju pli mi legas la Biblion, des malpli mi estas tentata kredi.
Kion, fakte, mi lernis el la Biblio?

1 — Dio konas estantecon, estintecon kaj estontecon.

2 — La estonteco ne povas esti sanĝita, ĉar Dio ĝin konas (despli ke li mem ĝin determinis).

3 — **Libervolo do ne ekzistas**, alie Dio ne konus estontecon…kaj ne estus Dio.

4 — Kiam Dio kreis homon, li kreis ĝin *neperfekta*.

5 — Li kreis ĝin *intence* neperfekta.

6 — Kaj li scias ĉiujn krimojn, kiujn faros la homo, ĉar Dio konas estontecon.

7 — Ĉar li kreis la homon *intence neperfekta*, Dio do rekte kaj persone respondecas pri tiujn krimojn. **Kion pensi pri Dio?**

8 — Homo estante kulpa pri tiuj krimoj, pri kiuj Dio mem respondecas, kion faras Dio por pentofari ĉiujn tiujn krimojn (fakte, ne tiujn, sed **siajn** krimojn)?

9 — Dio kondamnas *sian propran filon* al la plej terura morto kiu eblas: *morti najlita vivanta sur kruco*. **Kion pensi pri tiu Dio?**

**Tio estas tre ekzakte tio, kion diras la Biblio. Plej bone, do, ne legi la Biblion se oni volas esti kredanto!**
Bedaŭrinde mi legis la Biblion. Mi do iros en inferon, ĉar Dio tion volis.
Dankon, Dio!

Jean Marin (Francio)

## Religioj kaj sekseco

Ne estas seninterese studi kelkajn inter la pli grandaj religioj pri iliaj rilatoj kun sekseco.

**Hinduismo**

Sendube unu el la pli senĝena kun sekseco: oni trovas ĉe ĝi veran laŭdegon de amoro kun Kamasutro kaj la skulptaĵoj sur la muroj de la temploj (speciale tiuj de Khaĝuraho).

**Budhismo**

Neniu malpermeso, neniu nocio de eraro aŭ peko.

**Anglikanismo**

Virinoj rajtas fariĝi pastroj.

Pastroj kaj episkopoj edziĝas.

Samseksemuloj rajtas fariĝi pastroj kaj episkopoj.

**Luteranismo**

La pastroj edziĝas.

Foresto de problemo rilate tiun temon, ĝis tiu punkto ke, antaŭ kelkaj jaroj, oni eĉ vidis du parojn de pastroj vivantaj en kompleta komuneco, inkluzive seksa.

**Katolikismo**

Kontraste kun protestantaj eklezioj:

— Rifuzo de edziĝo de pastroj.
— Rifuzo de ordinacio de virinoj.
— Rifuzo de reedziĝo de eksedziĝintoj.
— Rifuzo de edziĝo de samseksemuloj.

Aspekto iom obseda de sekseco: dum konfesoj, revenantaj demandoj al geknaboj koncernante “malpurajn gestojn”.

Sed, malgraŭ (aŭ pro) tiu grava rigoreco, interalie la rifuzo de edziĝo de pastroj, multnombraj kaj laŭtegaj skandaloj:

Pastroj implikitaj en fipalpadoj kaj seksperfortoj de knaboj kaj knabinoj.

— 20 000 viktimoj en Germanio (laŭ deputito Ingrid Matthäus–Maier)

— 13 000 viktimoj de pli ol 5000 pastroj en Usono (laŭ John Jay Report 2005): viktimoj por kiuj la Papo mem petis pardonon.

Estas interese noti, ke tiaj kazoj de pedofilio estas preskaŭ nulo ĉe rabenoj kaj protestantaj pastroj kie geedzeco de la pastroj estas kvazaŭ regulo.

La mito de la virgulino Maria: ŝi edziniĝis 12-jaraĝa kun Jozefo, 30-jaraĝa, ŝia kuzo; kiam ŝi estis 15-jaraĝa, (14 laŭ la papo Johano-Paŭlo II), ŝi estis fekundigita de la Sankta Spirito. Sed, kio estas Sankta Spirito: unu el la tri komponantoj de Dio mem.

Kaj, kion diras al ni la Biblio, kion faris Dio? Li gravedigas knabinon 15-jaraĝa.

En la franca juro tio nomiĝas pedofilio, puninda de 7 ĝis 10 jaroj da malliberejo.




**Islamo**

Alian ekzemplon proponas Islamo: Mohamedo.

— 25-jaraĝa li edziĝas kun sia ĉefino Kadidja (40 jaraĝa).

— 50-jaraĝa edziĝas kun Aishan (6-jara) (hadito 114)

— 53-jaraĝa metas Aishan (9-jara) en sian

liton (Sahib Boukhari 5-58-216)

Sahib Boukhari parolas pri Mohamedo:

— “Li havis seksan potencon tiom grandan kiom tiu de 30 viroj” (S.B. vol.1, hadito 250)

— “Li povis amori kun 9 virinoj la saman tagon” (S.B. vol.7, libro 62, hadito 6)

— “Li edziĝis pli ol 10 fojojn, inkluzive kun Zahinab, la edzino de sia filo”

Mohamedo estas tiom admirinda, ke oni devas lin imiti:

En la landoj kie regas Islamo, la aĝo de la geedziĝo por la “virinoj” estas plej ofte fiksita inter 9 kaj 10 jaroj.

Kelkaj aŭtoritataj opinioj:

— Sauda Arabio: “La knabinoj estas maturaj por edziniĝo je 10 jaroj” (La Granda Muftio).

— Maroko: La ŝejko Al Maghavi pravigas la edziĝon kun knabinoj 9-jaraĝaj.

— Irano: M. Asfemani: “Knabino atingas puberecon 9-jaraĝe kaj estas preta edziniĝi”.

Korano: “La periodo de atendo (antaŭ edziniĝo) estas de 3 monatoj por la fianĉinoj kiuj ne jam havas siajn menstruojn” (Korano 65-4-5).

Ĉio tio baziĝas sur la ekzemplo de Mohamedo kaj rilatoj kun Aisha.

La aplikado de tiuj religiaj preceptoj estas timindaj:

— Antaŭ nelonge, en Gazao, Hamas patronis edziniĝon de 200 knabinoj kies plimulto estis malpli ol 12-jaraĝaj.

— En 2009 en Jemeno knabino edziniĝinta perforte mortis post 3 tagoj da abomenaj suferoj en akuŝa ĉambro

— Antaŭnelonge patro vendis sian knabinon. La nova posedanto provis penetri ŝin. Nesukcesinte, li prenis tranĉilon kaj tranĉis al ŝi la vaginon. Tiam li sukcesis penetri ŝin. La morgaŭan tagon la knabino mortis, malplenigita je sia sango.

Tiu ĉi flanko iom obseda de la sekseco fariĝas kelkfoje stranga:

La egipta Nacia Komitato de Virinoj alvokis al la parlamento ne voĉdoni por du leĝoj:

— unu por malaltigi la aĝon de edziniĝo por knabinoj.

— alia por permesi al edzo havi seksajn rilatojn kun sia edzino dum 6 horoj post ŝia morto!

La kristana religio ne estas multe pli favora por la virinoj kiuj timas Kriston: “Virinoj submetiĝu al la Sinjoro ĉar edzo estas la ĉefo de la edzino same kiel Kristo estas la ĉefo de la eklezio.” (5Ep-5-22)

**Jean Marin** (**Francio**)

---

## La islamigo de jud-kristanaj konceptoj

Islamo estis and restas malfacila temo por la Okcidento. Eble la okcidentano suspektas ke estas ia rilato, eĉ simileco, inter Islamo kaj sia historia Kristanismo, sed la islamanoj ne akceptas la krucigon de Kristo, kaj akuzas la kristanojn pri malscio kaj misfido, malgraŭ la profeteco de ilia supozita filo de Dio. La judoj ankaŭ vidas iom da simileco, sed longa historio de malamikeco, komencante ekde kiam Mohamedo atakis la lokajn judajn tribojn, lasis pli da suspekto ol scivolo. Tiu proksimo-kun-malproksimo, rilato-kun-aparto antaŭfiguras la komplikajn klopodojn kompreni Islamon el okcidentema vidpunkto.

La Eŭropa mezepoko postlasis vastan mis- kaj mal-komprenon kune kun suspekto kontraŭ Islamo, kiam ĝi estis vidita kiel malvera religio fondita de malvera profeto, kiel ilustrita, ekzemple, en *La Dia Komedio* de Dante. Ankaŭ la judoj, precipe tiuj vivantaj en la koro de Islamujo, skribis sian kontraŭ-islaman polemikon, eĉ se tion ili grandparte faris hebree. Sed same kiel la eŭropanoj komencis la intelektan movadon de la biblia "alta" kritiko, inversigante la tradiciajn ideojn pri la aŭtoreco kaj difonteco de la Biblio kaj trovante tie homajn manojn, ili ankaŭ sian rigardon turnis al Islamo kaj ĝia sankta libro. Aparte notindas la hungaro Ignaz Goldziher, la nederlandano Christiaan Snouck kaj la germano Theodor Nöldeke, kiuj ĝisfunde studis la Koranon kaj Islamon en la 19-a jarcento. Interese, Goldziher trovis similecon inter la Korano kaj fontotekstoj ne-ortodoksaj judaj kaj kristanaj.

Malgraŭ tiaj klopodoj, la Korano kaj Islamo, male al Judismo kaj Kristanismo, restas rimarkinde sub-studataj. Ties parta kialo estas politikaj konsideroj, sed laŭ mia vidpunkto, tion grandparte kaŭzas la malvolo kaj hezito de islamanoj mem por studi kaj kompreni la originojn de sia religio. Kiel ano de islama socio, mi mem ŝatis kaj daŭre emas esplori kaj pli profunde kompreni la fontojn, sintenojn, kaj mondrigardon de Islamo kaj Islamanoj.

Ekante de la supozo ke Islamo estas homorigina fenomeno, tute bazita en ĝiaj historiaj kaj geografiaj kondiĉoj kaj lanĉita el la specifa intelekta disvolviĝ-nivelo, kiu normis en tiu epoko, ni povas ekprogresi por komenti pri kredoj, imagoj kaj sintenoj islamaj kiuj, dum ili restas kiel mensa kaj morala valoro por centoj da milionoj da islamanoj, ofte pasas neekzamenitaj kaj nur supraĵe komprenitaj. Tamen, la plej rimarkinda eco de islamaj konceptoj, ĝenerale, ne estas iliaj originoj mem, sed la rilato inter iliaj originaj sencoj kaj celoj, kaj iliaj nuntempaj formoj. Malsupre ni notos kelkajn tiajn konceptojn, kaj komentos pri ilia origino kaj ilia nuna uzado. Ni rimarku, ke dum mi kritikos la islamajn konceptojn, komparante ilin kun la judaj kaj kristanaj, mi neniel intencas prezenti tiujn kiel superajn al la islamaj, sed nur kiel antaŭokazajn, tial bazajn kaj kiel devenlokon, kiun Islamo modifis kaj ŝanĝis.

## Ĉielo kaj infero

Kiel multaj aliaj konceptoj, la ĉielon kaj inferon Islamo probable elĉerpis el la Kristanismo. Sed elstaras du rimarkindaj malsamaĵoj: unue, la nomo, kaj due, la celo. En Islamo, la ĉielo ne vere estas ĉielo; ĝi estas "ĝannah", paradizo, aŭ pli precize, ĝardeno. La ideo ne estas supreniri kiel spirita rekompenco por fido (pri kio ni parolos plu pli poste), sed rekta, materia repago por monoteisme motivataj laŭ-Ŝariaj (Ŝaria: islama leĝaro) faroj. Ĝi staras kiel kontraŭ-cirkaŭaĵo al la senkompata dezerta hejmo de la araboj, kaj plu, ĝi ofertas tute malspiritajn karnajn plezurojn (inter aliaj, vinon kaj sekson). Tial ĝi ne estas la destino de savo, sed la rekompenco de sovaĝo. Ankaŭ la infero, tute malproksimas de la ideo de malsavo, kaj nur reprezentas torturan, senkompatan punon pro nekredo je la religio kaj ĝia profeto kaj pro ne-agado laŭe. En tia senfina, kruelega dezerto, homoj restos

senfine. Ankaŭ trafe al tiu ĉi temo, la dua nomo de la infero, aldone al "nâr" (fajro) estas "ĝahannam", Esperante "geheno", derivita el la hebrea "Gehinnom", iu valo ekster la antikva Jerusalemo, kien estis ĵetitaj la postrestaĵoj de la neobeintaj Izraelidoj, destinitaj al senfina malbeno de Javeo. Kompreneble, neniu mencio pri tio estas farita en la islamaj fontotekstoj; kiel en aliaj kazoj, ĉia mencio de originoj, veraj originoj, estas malatentata.

### Ĉu Islamo estas fido?

En la Korano kaj tra centoj da jaroj da islamaj skriboj, la vorto "fido" aperas tre amplekse. Ĉi-tage, oni multfoje aŭdas la esprimon "la islama fido". Sed ĉu Islamo estas vere "fido", en la sama senco de la kristanismo? Ĉu tiu vorto ne estis miskomprenita, aŭ pro malscio aŭ pro imito? Je kio Islamo postulas fidon? Je la monoteismo. Sed la monoteismo estis tiuepoke jam de longe konata kaj praktikata de la judoj, kaj eĉ la kristanoj (en sia aparta maniero). Tiel ni diras ke la monoteismo ne estis nova koncepto, sed, male, eĉ la Korano agnoskas pri la paganoj, "Se vi demandos al ili pri kiu kreis la ĉielojn kaj la teron, ili diros, Alaho (Dio)." Do la tiamaj araboj konis pri kaj ankaŭ akceptis la monoteismon. La vera senco de la fido, kiu mankas en Islamo, devenas de la kristana postulo, ke la fidantoj akceptu la reviviĝon kaj elleviĝon de morta homkorpo, precize ĉar tio estas absurda kaj kontraŭ-reala. Rekompence, la korpo de la kristano ankaŭ reviviĝos. Kaj tio ekzakte estas la fido pri la "elleviĝo de la karno", kiun priskribis Tertuliano. Sed pri kio temas la fido, tiel nomata, en Islamo? Ne pri nova, sav-dona ideo, sed pri tio, ke unue, vi estas sklavo de Dio, kaj due, ke Mohamedo estas la profeto de Dio, obeinda je ĉiuj detaloj. Baze sur tiuj, vi devas sekvi la Ŝarion, inkluzive de la preĝo, fasto, milita ĝihado, sklav-posedo, ktp, kaj tiel devos vi fari ĝis la juĝo-tago. Islamo, do, ne estas spirita fido en la kristana senco, sed nefleksibla leĝaro, kiu kaŝas sin sub la ombrelo de monoteismo.

### Ne filo, sklavo

Ekde la plej antikvaj epokoj, la religioj ĉiam serĉadis manieron por (re)konekt kun la Dio(j). Tion la Judismo trovis en la koncepto de la elektita popolo, elektita laŭ tio, ke ili devas teni la halaĥon (di-prezentita leĝaro) de sia nacia dio Javeo, mem simbolo de ilia forto kaj vivtenemo. Sed tie ĉi temas ankaŭ pri samvojaneco (t.e., la judoj vojaĝas samvoje kun Dio), pri asocieco, ne nur pri post-sekvemo. La judoj ne nur sekvas Javeon, sed ili ankaŭ partoprenas kun Javeo kaj kune kun li decidas, kaj rajtas trovi novajn solvojn por novaj kondiĉoj. Simbole, Jakobo luktis kun Dio kaj venkis lin. La leĝon tenas la judoj, sed la leĝo ne tenas ilin. Kiu estus Javeo sen sia favorata popolo? Tion la islamano neniam pensus nek imagus. Por li, paradokse, Dio postulas adoron, kaj samtempe bezonas nenion. Tamen, post-judisme, la kristano diris: Ni fariĝu gefiloj de Dio. Tiel elektiteco anstataŭis filecon. Fine iĝis Dio homo, kaj la homo diiĝis. Ne nur tiel, sed la kristano ankaŭ akceptis ĉielan vojon al la eterna beno kaj vivo, samtempe ĝuante gracon en tiu ĉi mondo. La halaĥo estis forigita kaj la regno de Dio alvenis; la ŝabato estis forĵetita kaj la jaroj de nia Sinjoro (anno Domini) bonvenigitaj.

Ses cent jarojn poste, la Islama profeto ofertis nenion novan: nur emfazinte la monoteismon, kruelan kaj sennuancan en s

ĝia simpleco, li jugis la mondon per aldia sklaveco. Estu sklavo, obeu, kaj vi atingos materian paradizon ofertontan plezurojn neitajn al vi nunmonde. La Judismo havas nuancportan elektitecon, la Kristanismo gefilecon, sed la Islamo nur senpensan sklavecon. Pri tio la islamanoj kutime fieras; sed rigideco kaj senpensemo ne fierindas. Surbaze de tio, ankaŭ la sklavigo trudata al aliaj homoj estas validigita kaj neniam rifuzita modernepoke. Eĉ sklaviĝ-rakonto pri la komenco de rilato kun la ĉiela sklav-posedanto estis problemplena kaj entute malfavora al la homo: la Korano diras ke Dio prezentis la "konfidon" (laŭ kiu necesas obei Dio kaj sklav-konduti kontraŭ li) al la ĉielo kaj tero kaj montaro, kaj ili, tute saĝe, rifuzis ĝin. Nur la homo ĝin akceptis; kaj pro ilia naiva peno, la Korano lin priskribas kiel "malsciulon." Klare ni staras tie ĉi antaŭ tordita versio de la Hebrea "brit" (interkonsento kun Dio), ne nur universaligita kaj ankaŭ severe misfigurigita. Tiu misfigurigo ankaŭ estas enkorpigita en la nomo de la profeto mem, Muhammad ibn Abdullah, "Mohamedo, filo de la sklavo de Dio" ("Abdullah" estis la nomo de lia patro kaj signifas "sklavo de Dio"), nomo kiun, ni memorigu, iuj orientalistoj konsideris inventita dum posta epoko de islam-defenda polemiko, kaj ne la origina nomo de la araba profeto.

Fine, mi resumu, ke la ĉefa celo de tiu ĉi artikolo estis kritiko pri la originaj kaj bazaj konceptoj de Islamo, tiel ke Islamo elradikigis tiujn konceptojn de ilia juda kaj kristana grundo, kaj tordis ilin, kaj malkonektis ilin de ilia pra-intenco. Alivorte, Islamo alpruntis tiujn konceptojn en artefarita maniero, kaj utiligis ilin por sia politika supervenko, sen ĝuste kompreni ilin.

Ali Al-Mufaddal (loĝas en araba lando)

---

## Mortpuno pro ateismo

En la lastaj tagoj de marto ĉi-jare aperis du artikoloj en britaj gazetoj pri la landoj, kie ateistoj povas ricevi mortkondamnon.

En la ĵurnalo *Independent* la 30an de marto aperis artikolo kun la titolo "La 13 landoj, kie la fakto esti ateisto estas punebla per la morto". Tiuj landoj, laŭ la listo en *Independent* estas: Afganujo, Irano, Jemeno, Kataro, Malajzio, Maldivoj, Maŭritanio, Niĝerio, Pakistano, Sauda Arabujo, Somalujo, Sudano kaj Unuiĝintaj Arabaj Emirlandoj.

En multaj aliaj landoj, kvankam ateismo ne formale kondukas al mortkondamno laŭ la leĝo, tamen okazas ke ateistoj kaj humanistoj estas murditaj de religiaj ekstremistoj pro siaj opinioj. Almenaŭ tri ateismaj blogantoj estis morte dishakitaj en Bangladeŝo, post kiam ili aperigis artikolojn, en kiuj ili konsilis, ke oni bazu siajn opiniojn sur sciencaj pruvoj prefere ol religiaj kredoj. Aŭdiĝis akuzoj kontraŭ la polico, ke ĝi nur indiferente esploris tiujn murdojn, tiel praktike ignorante ilin.

La 26an de marto, ankaŭ la revuo *The Economist* enhavis artikolon pri la sama temo, kun pli da informoj pri specifaj ekzemploj. Laŭ tiu artikolo, en 2014 Sauda Arabujo aprobis leĝon, laŭ kiu ateismo estas ekvivalenta al terorismo. En februaro, juna saudo estis kondamnita al dekjara

mallibereco, granda monpuno kaj 2000 vipobatoj, ĉar li anoncis sian ateismon en Tvitero. Sed fakte li estis eĉ bonŝanca, ĉar alia junulo, kiu aperigis filmeton de si mem disŝiranta Koranon, estis kondamnita al morto.

Eĉ en landoj, kiuj ne rekte kontraŭleĝigas eksislamiĝon, oni trovas manierojn por malfaciligi la vivon de homoj, kiuj forlasas la religion. En Omano, Kuvajto kaj Jordanio islamaj tribunaloj povas nuligi la geedziĝon de tiuj, kiuj forlasas Islamon, aŭ malhelpi ilin ricevi heredaĵojn. En Pakistano oni povas forpreni la infanojn de paroj, kiuj konvertiĝas for de Islamo.

En landoj, kiuj ne havas leĝojn kontraŭ eksislamiĝo, oni ofte utiligas anstataŭe la leĝojn kontraŭ blasfemado. En Egiptujo, 21-jara studento, Karim Ashraf Muhammad al-Banna, ricevis kondamnon al tri-jara mallibereco, post kiam li anoncis sian ateismon en Fejsbuko. Ateismo en si mem ne estas kontraŭleĝa en Egiptujo; anstataŭe oni akuzis lin pro insultado kontraŭ religio. Oni utiligis la leĝon kontraŭ blasfemado ankaŭ en Pakistano, kiam kristanino Asia Bibi estis kondamnita al morto en 2010 post akuzo, laŭ kiu ŝi laŭdire misfamigis la profeton Mohamedon. Tiu akuzo sekvis personan kverelon kun grupo de islamaj najbarinoj. (Laŭ la angla Vikipedio, en aprilo 2016 ŝi restas ankoraŭ nun en malliberejo, post pluraj apelacioj kaj prokrastoj de la proceso.) Intertempe Salman Taseer, la guberniestro de Panĝabo, kiu anoncis sian intencon pardoni ŝin, estis murdita en 2011 de sia propra gardisto.

Malgraŭ la grandaj riskoj por religidubantoj en la islama mondo, abundas scivolo pri ateismo. Laŭ Google Trends ("Tendencoj"), la sep landoj de kie oni plej ofte serĉas la terminon "ateismo" estas ĉiuj en Mezoriento. Esploro en 2012 de WIN/Gallup International montris, ke brazilanoj estas pli religiaj ol afganoj, kaj armenoj pli fervoraj ol irakanoj. La proporcio de saudoj, kiuj deklaris sin "konvinkitaj ateistoj" estas proksimume sama kiel ĉe usonanoj.

**La redakcio de Ateismo**
(**kun danko al Diccon Masterman kiu sendis al ni la artikolon el The Economist**)

## Ondo de netoleremo en Barato

Kiam la hindia verkisto Uday Prakash [udej prakaŝ] anoncis, ke li redonas sian premion al la nacia beletra akademio, Sahitya Academy [sahitja akademi], neniu supozis, ke dekoj da verkistoj kaj intelektuloj sekvos lian agon. Sed okazis ĝuste tio.

Ili protestas kontraŭ la ondo de netoleremo tra la tuta lando ekde kiam la nuna registaro – dekstrema, hindunaciisma koalicio – gajnis potencon en 2014. De 2013, tri konataj raciistoj kaj ateistoj estis murditaj en Barato: N. A. Dabholkar (en 2013); G. Pansare (2015); kaj M. M. Kalburgi (2015). Ĝis nun, neniuj estis arestitaj. Ĉiuj tri homoj forte kritikis kelkajn tradiciojn kaj kutimojn de la hinduismo.

De diversaj partoj de la lando venas raportoj pri minacoj kaj atakoj kontraŭ religiaj (kaj aliaj) malplimultoj. En septembro 2015 okazis amasatako kontraŭ islamana familio dum kiu oni mortigis s-ron M. Akhlaq. Laŭ la polico, estis malvera onidiraĵo en najbara hindua templo, ke la familio de Akhlaq buĉis bovinon, kaj manĝis la bov-

viandon.

Intertempe komence de 2016 akriĝis atakoj kaj agresoj kontraŭ universitatoj tra la lando. Jam de jardekoj la ĉefe altkastaj funkciuloj de la universitatoj en la lando reagas negative al la eniro en la eduksistemon de la dalitoj (la iamaj "netuŝebluloj" de la kastsistemo) kaj aliaj marĝenigitaj grupoj. Sed, kiel rimarkas Probal Dasgupta en artikolo en *Monato*: "La ferociĝinta agresemo estas nova simptomo, ligita al la ekstrema karaktero de la nuna registaro en Delhio." La (anglalingva) retejo http://www.modifacts.org/, ekzemple donas multajn ekzemplojn plurkampajn pri tiu ekstrema karaktero.

***Intertempe komence de 2016 akriĝis atakoj kaj agresoj kontraŭ universitatoj tra la lando.***

Observantoj notas, ke tiuj ĉi atakoj ankaŭ tiras la atenton for de la tamtamata ekonomia kresko kiu efektive ne plibonigas la vivojn de la plimulto de baratanoj – laŭ pluraj mezuroj, la vivo de la malriĉularo efektive malpliboniĝis dum la pasintaj kelkaj jaroj. La nuna registaro simple ne sukcesis plenumi siajn ekonomiajn promesojn.

Multaj voĉoj en la lando nun postulas, ke la registaro de N. Modi agu por protekti la demokratiajn valorojn de leĝeco kaj libereco. Kiel diris la verkistino Shashi Deshpande [ŝaŝi deŝpande] al la registaro, "la silentemo estas formo de konsento". Aliflanke, ĉu aŭ ne la diversaj movadoj sukcesos solidarece rezisti la dekstremajn fortojn restas demando malfacila. Sed la relative brua amaskomunikilaro kaj socia medio certigas, ke ili ne restos silentaj.

A. Giridhar Rao (Barato / Hindio)

## Afabla sen Dio

*Studo: Esploristoj ekzamenis la sociajn sintenojn de infanoj – religieca eduko igas ilin netoleremaj.*

(Berlino / taz) Internacia studo de la Universitato de Ĉikago prezentas apogilojn por kritikantoj de religioj. Ĝi montras ke infanoj el religiema medio estas malpli sociemaj kaj pli necedemaj. Ili malpli dispartigas havaĵojn ol nereligiaj samaĝuloj kaj krome ili juĝas pli severajn punojn adekvataj.

Speciala skandaleto pri tio: La studo estis promociita de Fondaĵo John Templeton. Tiu konservema usona fondaĵo celintence subtenas esplorojn, kiuj pritraktas rilatojn inter sciencoj kaj spiritualeco. Kritikantoj eĉ riproĉas al ĝi porreligian lobiadon ("koridoran agadon").

Pro tio nun ŝajnas, ke la artikolo eldonita en la fakĵurnalo *Current Biology* estas sinpafo. La evolupsikologo kaj profesoro de neŭrologio Jean Decety kaj lia teamo ekzamenis la socian konduton kaj toleremon de 1 750 geinfanoj aĝaj inter kvin kaj dek du jaroj. La junaj gepartoprenintoj el Kanado, Ĉinio, Jordanio, Sudafriko, Turkio kaj Usono ĉefe venis el islamanaj (43%), kristanaj

(24%) kaj nereligiaj (28%) familioj. Etaj grupoj judaj, budhanaj, hinduaj kaj agnostikaj estis kompare sensignifaj.

La t.n. "diktatorludo" malkovris, kiom altruismaj estis la geekzamenatoj. Por tiu psikologia eksperimento ili ricevis dek glumarkojn, kiujn ili rajtis pludoni al nekonata infano. La logiko: ju pli da donacemo, des pli da altruismo.

Por pritaksi la empatian kapablon, la esploristoj krome montris mallongajn movbildojn montrantajn, kiel unu figuro alian puŝis aŭ premis – sen aŭ kun intenco. Post tio la infanoj devis pritaksi, kiom malica estis la konduto kaj kia puno estus adekvata.

En ambaŭ kategorioj la geknaboj el religiaj familioj atingis malpli bonajn rezultojn ol tiuj sen religia edukado. Pli malofte ili pludonis glumarkojn, pli severe ili prijuĝis kaj estis malpli toleremaj, se temis pri punado de aliaj. Similaj rezultoj, cetere, ankaŭ ekestis el studoj pri plenaĝuloj.

Interese estas, ke la konduto de la infanoj klare kontrastis al la percepto de la respektivaj gepatroj. Precipe religiemaj familioj atribuis pli da empatio al siaj idaroj. Ofta miskonkludo, kiel klarigas la aŭtoro de la studaĵo, Decety: "Niaj rezultoj kontraŭas al la kutima kaj ĝenerale ŝatata supozo, ke infanoj el religiemaj mastrumoj estas pli altruismaj kaj afablaj rilate al aliaj personoj. En niaj studoj infanoj el ateismaj kaj nereligiaj familioj fakte estis pli malavaraj."

Speciala malbonŝanco por la idoj: Ju pli longe ili estis influataj de religiema medio, des malpli ili fariĝis donacemaj. Ĉar principe validas: Ju pli aĝaj estas infanoj, des pli donacemaj – kondiĉe ke religio ne ludas rolon.

"La rezultoj montras, ke sendepende de landlimoj, religio negative influas altruismon ĉe infanoj", diras Decety. "Ili kontraŭdiras la opinion, ke religieco subtenas porsocian konduton, kaj ili kaŭzas dubojn, ĉu religio estas grava por la morala evoluo. "Sekularigo do tutcerte ne reduktas homan bonkorecon – fakto estas la ekzakta kontraŭo."

El: "die tageszeitung" (taz), 6 januaro 2016, p.18

tradukis Winfried Schumacher (Germanio)

---

## Mondo dividita: senreligieco kreskanta kaj malkreskanta

En aprilo ĉi-jare aperis artikolo en la retejo de la fama usona revuo *National Geographic* kun la stranga titolo "La plej nova granda religio de la mondo: senreligieco". Atentokapta, jes, sed temis ne ĝuste pri religio, sed pri kategorio de religia apartenado aŭ ligiteco. Laŭ la artikolo, la kategorio de homoj, kiuj nomas sin "religie neligitaj" kreskas konsiderinde, kaj nun konsistigas la duan plej grandan "religian" grupon en Nordameriko kaj en la plejparto de Eŭropo. En Usono, la neligitoj jam estas preskaŭ kvarono de la loĝantaro (kompare kun sesono en 2007), preterpasinte en la lasta jardeko katolikojn, ĉefekleziajn protestantojn, kaj ĉiujn anojn de nekristanaj religioj. En kelkaj aliaj okcidentaj landoj, tiu tendenco estas eĉ pri forta. En Francio, Nederlando kaj Nov-Zelando la majoritato de la enloĝantaro

baldaŭ estos senreligiaj. (Tiel, fakte, jam estas en Ĉeĥio kaj Svedio.) Kaj en Britio kaj Aŭstralio, la majoritato konsistos baldaŭ el ne-Kristanoj, inkluzive senreligiulojn.

La artikolo fokusiĝas ĉefe je Usono, atentigante pri kelkaj ecoj de la neligitaro. Kiel en multaj landoj tutmonde, ili estas sufiĉe diversaj, kun ateistoj, agnostikuloj, kaj tiuj, kiuj preferas ne deklari sian precizan formon de nekredo, kun homoj kiuj emas aparteni al organizitaj grupoj kaj tiuj, kiuj ne tiel emas. Nun en Usono ekzistas gamo da organizaĵoj, grupoj, kaj retaj forumoj, kie senreligiuloj povas trovi samideanojn kaj ne senti sin solecaj. Tamen, operacia direktoro de la Fondaĵo Richard Dawkins rimarkigas, ke "organizi ateistojn estas kiel arigi katojn". Malfacilas unuigi homojn surbaze de nekredo je io. Samtempe, laŭ la artikolo, estas problemo de manko de diverseco inter usonaj nekredantoj: ili estas plejparte blankaj viroj. Ĝi citas nigran virinon, prezidanto de organizaĵo Black Nonbelievers (Nigraj Nekredantoj), kiu diras, ke "se oni sin identigas kiel nekredanto, oni estas rigardata kiel perfidanto de la propra raso", pro la grava rolo de eklezioj en la afrik-usona komunumo kaj ilia historio de lukto por egalaj rajtoj.

Kial kreskas senreligieco en Usono? Parte estas kontraŭreago al forta kresko de religia fundamentismo kaj engaĝiĝo de fundamentistoj en usona politiko en la lastaj 40 jaroj. Ĝis hodiaŭ, oni vidas en Usono "kulturajn militojn" ligitajn kun interveno de religio en politika kaj ĉiutaga vivo. Parte estas pro generacia ŝanĝiĝo: la tiel nomataj "jarmiluloj" (millenials), naskitaj en la 80aj jaroj aŭ poste, estas pli indiferentaj rilate al religio. Samtempe, en la lasta jardeko ekaperis la movado Nova Ateismo, kies plej fama figuro estas la brito Richard Dawkins. Tiu movado certe havis multe da influo en Usono.

***Estas klara ligiteco inter religieco unuflanke kaj malriĉeco, manko de vivsekureco, kaj manko de edukiĝo aliflanke.***


Tamen, dum kreskas senreligieco en Nordameriko, Eŭropo, Aŭstralio kaj Nov-Zelando, kaj Japanio kaj Ĉinio restas sufiĉe nereligiemaj, la artikolo atentigas pri kontraŭa tendenco en aliaj partoj de la mondo, pli malriĉaj, speciale subsahara Afriko. En tiu cetera mondo, religia apartenado kreskas rapide, simple pro demografia kresko. La artikolo enhavas ligilon al raporto de la esplor-centro Pew (eldonita en aprilo 2015) kun la titolo "La estonteco de mondaj religioj: prognozoj pri kresko de loĝantaroj 2010-2050", laŭ kiu, la proporcio de religie neligitaj homoj fakte falos je tutmonda skalo, ekde la nuna 16% ĝis 13% en la venontaj 35 jaroj. Plej rapide kreskos la nombro da islamanoj, ekde la nuna 23% ĝis preskaŭ 30% de la monda loĝantaro, preskaŭ tiom, kiom la kristanaro, kiu konsistigos iom pli ol 31%. Klarigas tiu Pew-retpaĝo: "La hodiaŭa aro de religie neligitaj homoj forte koncentriĝas en lokoj kun malalta fekundeco kaj pliaĝiĝantaj loĝantaroj, kiel Eŭropo, Nordameriko, Ĉinio kaj Japanio."

Estas klara ligiteco inter religieco unuflanke kaj malriĉeco, manko de vivsekureco, kaj manko de edukiĝo aliflanke. Fakte, eĉ pli bonstataj, pli edukitaj homoj en ĝenerale malriĉaj landoj emas esti religiemaj, kiel ekzemple en Barato / Hindio. En sia “Enketo pri tutmondaj sintenoj – printempo 2015”, Pew aperigis grafikaĵon, kiu montras la ligitecon inter religieco (t.e. kiom grava estas religio por la enketitoj) kaj malneta landa enspezo pokapa. Pew resumas ĝin jene: “Ĝenerale pli malriĉaj landoj estas religiemaj; riĉaj malpli, escepte de Usono”. Estas interese, ke Usono kaj Ĉinio estas maloj kiel esceptoj al la inversa korelativeco inter religieco kaj pokapa land-enspezo. Malgraŭ la kresko de senreligieco tie, Usono daŭre restas sufiĉe religia lando; laŭ Pew, 53% da usonanoj diras, ke religio estas tre grava por ili, kompare kun 21% da britoj kaj nur 3% da ĉinoj. Fakte, ankoraŭ 77% da usonanoj ligas sin al iu religio.

Konklude, mi ŝatus demandi: ĉu kreskantaj pokapaj land-enspezoj en nunaj malriĉaj, religiemaj landoj kreskigos estontece senreligiecon? Tio estas dubinda. Ekzemple, Malajzio havas pokapan enspezon je sama nivelo kiel Pollando, kvaroble pli altan ol Barato/ Hindio, sed estas simile religiema, laŭ Pew (ĉirkaŭ 80%). Eble tio estas ĉar iom

**Generally, poorer nations tend to be religious; wealthy less so, except for U.S.**

*% who say religion is very important in their lives*




*2015 GDP per capita (PPP, current international $)*

Source: Spring 2015 Global Attitudes Survey. Data for GDP per capita (PPP) from IMF World Economic Outlook Database, October 2015, accessed Oct. 29, 2015. Data for Palestinian territories GDP per capita (PPP) is for West Bank and Gaza from World Bank, 2014, accessed Oct. 29, 2015.

“Americans are in the middle of the pack globally when it comes to importance of religion”

PEW RESEARCH CENTER

pli ol 60% da malajzianoj estas islamanoj. Sed la hinduoj de Malajzio (6% da loĝantoj) verŝajne estas samgrade religiemaj. Kaj, kompreneble, Usono, kvankam ne tiom religiema kiel Barato aŭ Malajzio, ankaŭ montras ke riĉeco ne signifas senreligiemon. Temas, do, ankaŭ pri kulturo kaj historio.

Nyegosh Dube (Pollando)

## Ateisma kunveno dum la brita kongreso

En la programo de la Brita Kongreso de Esperanto en Liverpolo aperis "Diservo" je la 9a horo dimanĉon matene, antaŭ la jarkunsido de la membroj je la 10a. Vidante tion, mi proponis samtempan kunvenon por ateistoj, humanistoj kaj liberpensuloj.

La organizanto klarigis al mi, ke la diservo ne estis oficiala parto de la programo, sed estis organizita de la interesatoj mem, antaŭ komenco de la oficiala programo je la 10a. Kompreneble, la homoj ĝenerale preferas resti en la lito iom pli longe dum la semajnfino, kaj ne frue kuri al la kongresejo! Do, mi fakte dubis, kiom da homoj post lastmomenta anonco en la sabata posttagmezo pretos leviĝi frue por veni al ateisma kunveno je la 9a.

Tamen, venis deko da homoj, inter kiuj estis du membroj de ATEO. Ni ne havis fiksitan temon, por ke la homoj estu liberaj diskuti ĝenerale pri ateismo. Ni parolis pri la signifo de la vortoj "ateismo" kaj "liberpensulo", kaj pri la fakto ke la vorto "Ateista" aperas en la nomo de nia asocio. Plurfoje estis proponoj ŝanĝi nian nomon, sed finfine, el ĉiuj proponoj "Ateismo" ŝajnas la plej neŭtrala kaj ĝenerala vorto por priskribi bazan sendian opiniaron. Mi estas kontenta aldoni, ke per tiu malgranda kunveno ni akiris unu novan membron.

Anna Lowenstein (Britio)

---

## Evoluoj en Islando

La publika kunveno de ATEO dum la UK en Islando estis inter niaj plej sukcesaj. Nia gasto estis Hope Knútsson, fondinta membro kaj tiama prezidanto de Sidmennt (Islanda Etika Humanisma Asocio), kiu rakontis al ni pri ĝia programo de laikaj konfirmacioj. Raporto pri tiu kunveno aperis en Atesmo n-ro 17, de novembro 2013.

Sidmennt aranĝas ne nur laikajn konfirmaciojn, sed ekde 2008 proponas aliajn laikajn kaj humanismajn ceremoniojn: nomceremoniojn por novnaskitoj, geedziĝojn, kaj funebrajn ceremoniojn. En majo 2013, Sidmennt estis oficiale rekonita kiel "sekulara vivfilozofia asocio", kio havis la sekvon, ke ĝiaj geedzigaj ceremonioj fariĝis jure validaj. Ekde tiam tiaj ceremonioj fariĝas ĉiam pli popularaj. En 2014 Sidmennt solenis 114 ceremoniojn, en 2015 199, kaj en 2016 antaŭvideble ĝi atingos 250. Tiuj ciferoj ne ŝajnas tre altaj, sed memoru, ke la tuta loĝantaro de Islando estas nur 330 000, t.e. malpli da homoj ol tiuj, kiuj ĝis nun aliĝis al la Esperanto-kurso en Duolingo!

En novembro 2015 Sidmennt mendis profesian esploron pri la vivfilozofioj de islandanoj. La dek ok demandoj inkluzivis multajn pri religiaj kredoj, kaj pri subteno al la luterana eklezio, kiu nuntempe ludas sufiĉe aktivan rolon en edukado kaj en la ŝtato ĝenerale. La rezultoj de la esploro montris, ke sekularaj vivfilozofioj rapide antaŭeniras en Islando. Nur 46% da islandanoj deklaris sin religiaj; tio estas la plej malalta proporcio en iu ajn esploro

ĝis nun. Kvankam 46% de la homoj deklaras sin kredantoj, el tiuj nur 36% kredas je la bazaj instruoj de la eklezio pri Dio, eterna vivo, kaj la Releviĝo de Kristo. Inter la plej juna aĝo grupo, 80,5% opinias, ke ne ekzistas certeco pri la ekzisto de Dio.

La esploro konfirmas ĝeneralan subtenon por la apartigo de la eklezio kaj la ŝtato. Pli ol 72% el tiuj, kiuj esprimis opinion pri la afero, favoras disigon. 46% opinias, ke la registaro ne devus financi iujn ajn religiajn aŭ sekularajn organizaĵojn, dum la aliaj aŭ subtenas la nunan situacion (29%), aŭ opinias, ke la ŝtato devus financi ĉiujn religiajn kaj sekularajn grupojn proporcie egale (25%). La rezultoj de la esploro estis eldonitaj en januaro 2016, kaj kaŭzis nacian debaton.




Sidmennt estas maltrankvila pri religia ekstremismo, kaj partoprenas en publikaj debatoj, ekzemple pri la demando, ĉu moskeo estu konstruita en Rejkjaviko. Multaj homoj kontraŭstaras tiun proponon per la argumento, ke tio kontraŭas “la kristanajn valorojn de la islanda socio”. Sidmennt male asertas, ke tio estas demando pri religia libereco.

Fine de 2014 Sidmennt organizis seminarion kun la titolo “Ĉu ni timu Islamon?” Unu el la celoj de tiu seminario estis ebligi debaton pri Islamo evitante esprimojn de religia kaj rasa malamo.

En la somero de 2015, la leĝo kontraŭ blasfemado estis nuligita, kun vasta subteno de ĉiuj politikaj partioj, kaj ankaŭ de la islanda episkopo kaj pastraro. La komento de Sidmennt al la Parlamento enhavis jenan alineon:

“Landoj, kie mankas demokrateco kaj libereco, ofte ricevas kritikojn ĉar ili punas homojn pro blasfemado eĉ per mortkondamno. Kiam tiuj landoj estas kritikataj, ili ofte atentigas, prave, ke similaj leĝoj ekzistas en la okcidentaj demokrataj ŝtatoj. Tial, se Islando forigos sian leĝon kontraŭ blasfemado, esenca mesaĝo estos sendata al la cetera mondo. Nacioj, kiuj retenas tiajn leĝojn kun seriozaj sekvoj, ne havu la eblecon montri al Islando kun la komento, ke ankaŭ ĝi havas tian leĝon.”

Notu, ke ekzistas en la islanda leĝaro malpermeso kontraŭ esprimoj de malamo kontraŭ malplimultaj grupoj, do tiu protekto ne estos forigita.

Anna Lowenstein (Britio)

# Ateismo

## organo de ATEO
## Ateista Tutmonda Esperanto-Organizo


| | |
|---|---|
| **Vorto de la redaktoro** | 2 |
| **La Parizaj Atakoj** | |
| Kiuj estas tiuj homoj? | 3 |
| Fluctuat nec mergitur | 5 |
| **Pri Ateismo** | |
| Al agnostikaj kamaradoj el SAT | 5 |
| Ĉu ateismo, ĉu sendieco? | 6 |
| Diversspecaj ateismoj | 7 |
| **Pri Religioj** | |
| Kredi aŭ ne kredi | 7 |
| Religioj kaj sekseco | 8 |
| La islamigo de jud-kristanaj konceptoj | 9 |
| **Ĉirkaŭ la Mondo: Novaĵoj kaj Tendencoj** | |
| Mortpuno pro ateismo | 12 |
| Ondo de netoleremo en Barato | 13 |
| Afabla sen Dio | 14 |
| Mondo dividita: senreligieco kreskanta kaj malkreskanta | 15 |
| **Ateisma Vivo** | |
| Ateisma kunveno dum la brita kongreso | 17 |
| Evoluoj en Islando | 18 |



Bonvolu sendi viajn artikolojn al la redaktoro: ateismo.bulteno@gmail.com

Por informoj: **Anna Löwenstein**, anna.lowenstein@esperanto.org



Prezidanto: (vakas)
Vicprezidanto: Dominique Simeone, Francujo
Sekretario: Anna Löwenstein, Italujo
Kasisto: Dieter Rooke, Svislando
Estrarano: Jakvo Schram, Belgio
Redaktoro: Nyegosh Dube, Pollando



Jarkotizo : 10 € por A-landoj
8 € por B-landoj